

BULGARA

5 • 1981

ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO





PAZARGĤIK PAROLAS KAJ KANTAS ESPERANTLINGVE

Juneco, beleco, talentoj renkontigis en Pazargĥik de la 3—5 de aprilo en la XIV Nacia Revuo de la Esperanto-Parolo kaj Kanto.

Tiu arango jam havas sian multjaran tradicion. Ĉi-jare ĝi estis dediĉita al la XII Kongreso de la Bulgara Komunista Partio kaj la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato. Tiuj du gravaj eventoj difinis la ĉeftemojn de la Revuo: la patrujo, la partio, la paco!

Dank' al la obstina kaj ambicia preparlaboro de la e-istoj de Pazargĥik ĉe la malfermo

de tiu tutlanda belarta E-festo la salono de la Junpionira Domo apenaŭ entenis la ĉirkaŭ 600 partoprenantojn kaj gastojn el ĉiuj anguloj de la lando.

Infana blovorkestro el Velingrad solene kaj impone muzikis ĉe la inaŭguro. Salutvortojn diris la prezidantino de Bulgara E-Junularo Stelijana Dimitrova, la prezidanto de la Komunuma Konsilio pri Kulturo en Pazargĥik Nikolaj Sopov kaj la vicprezidanto de BEA Petăr Todorov.

Sekvas sur p. 5

ENHAVO

*** Konkluda parolo de k-do Todor Ĵivkov ĉe la fermo de la Dekdua Kongreso de BKP . . .	1,2
*** Programo pri patriotisma edukado . . .	3,4
*** Pazargĥik parolas kaj kantas esperantlingve . . .	11, 5,6
K. Valev. ADA — ĉiam vivanta . . .	10,11
R. Konstantinova. Mia neforgesebla E-patrino . .	11

*** Ĉu ekzistas karakteriza E-kanto? . . .	14
D. Ĥitrov. Mirinda riĉaĵo de E-eldonaĵoj . . .	15
*** Kial la ka'o lavas sin post mango? (por via lingva perfekto) . . .	III
iv. Apostolov. Nia fabela Melnik . . .	IV
Sur la kovrilpaĝo: Kiril kaj Metodij — la unuaj slavaj instruistoj.	

Redakta komitato:

Donĉo ĤITROV (ĉefredaktoro), Marĥin BACEV, Vasil BOROVANSKI, Dimităr DENCEV, Evgeni GEORGIEV (sekretario), Dimităr ĤAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Ĥaim LEVI (vicĉefredaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodi GAREV
Korektis: Evgeni GEORGIEV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919 j.
Eldonkvanto 6 100.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,

1303 Sofio, Bulgario

tel. 32-40-68, 31-00-29

P. K. 66,

1000 Sofio



KONKLUDA PAROLO DE K-DO TODOR JIVKOV ĈE LA FERMO DE LA DEKDUA KONGRESO DE BULGARA KOMUNISTA PARTIO



KARAJ KAMARADINOJ KAJ KAMARADOJ,*

La Dekdua Kongreso de la Partio finis² sian laboron. Ni havas ĉiujn motivojn por diri: tio estis bona kongreso, forta kongreso, kongreso kun decida signifo por nia plua evoluo.

Al la Dekdua Kongreso la Bulgara Komunista Partio venis forta pro la popola konfido. La kongresa laboro pasis antaŭ la okuloj de la popolo. Oni povas kuraĝe diri: nia partio eliras el tiu ĉi halo ankoraŭ pli forta, eliras kun pli firma, pli riĉa popola konfido. Pli profunda pro la laboro kaj la decidoj de ĝia Dekdua Kongreso!

Ĉiu el ni, la 800 miloj da bulgaraj komunistoj, ĉiu el la miloj da partiaj agantoj per sia fideleco al la afero de la komunismo,

per sia laboro kaj konduto, per sia tuta vivo konstruas kaj firmigas la kredon de la popolo al la partio, portas personan respondecon pro tiu nia multvalora konkeraĵo.

Gekamaradoj,

En la Dekdua Kongreso parolis 214 personoj. Okazis vasta, reprezenta kaj kompetenta diskutado. La kongreso pasis je alta politika, ideologia kaj labora nivelo, kun la karakteriza por nia partio matureco, malkontento pri la atingaĵoj kun kompreno pri la novo kaj strebo al pli altaj celoj. La kongreso estis fino, kaj oni povas diri — kulmino de la tulparta kaj tulpopola diskutado. Ĝi fokusis en sin kaj esprimis la unuecon de la popolo ĉirkaŭ la partio kaj la partia politiko; la moralan kaj politikan unuecon de la popolo;

la pretecon kaj politikan unuecon de la popolo; la pretecon kaj la mobilizon de la partiaj organizaĵoj kaj la laborkolektivoj alpreni kaj decidi la novajn problemojn.

Ni plenrajte povas deklari: La Dekdua Kongreso ludos historian rolon en la konstruado de matura socialisma socio en nia lando.

Lige kun tio mi ŝatus substreki tri ĉefajn konkludojn, kiuj sekvas el la kongresa laboro.

Unue. Ni devas ankaŭ estonte teni forte kaj porti alte la standardon de la Lenina Aprila Linio de la partio, sub la standardo de tiu gvidlinio ni devas unuigi kaj organizi al batalo la partion kaj la popolon por solvi la la nuntempajn kaj estontajn problemojn de Popola Respubliko Bulgario.

Due. La kongreso ellaboris kaj akceptis ampleksan, sed klaran kaj realisman programon de agado kiel je tutlanda, tiel ankaŭ je faka kaj teritoria nivelo.

La senco kaj la enhavo, la ĉefa direkto de nia laboro dum la sekva periodo estas la ĉiutaga intensigo, la evoluigo de la socialisma demokratio, la plivigligo de la labora kaj socia aktivecoj, la plua plialtigo de la popola vivnivelo.

Trie. La novaj komplikaj kaj malfacilaj taskoj nepre postulas multe pli altan nivelon de la gvida kaj plenuma laboro en ĉiuj sferoj, je ĉiuj niveloj, en ĉiuj ĉeneroj de nia socio.

Sur la firma fundamento de la kvalitoj, karakterizaj por la bulgaraj komunistoj, por niaj aktivoj — abnegacia fideleco al la afero de socialismo, sanga ligiteco kun la popolo, sentata laboremo kaj strebo al scioj, al progreso, nun estas aparte grave:

— altigi la nivelon de la profesia kompetenteco kaj aferemo en la partio, en la ŝtato, en la ekonomio kaj kulturo, en la socia agado, en la sociaj organizaĵoj;

— altigi la kvaliton kaj la efikecon de la laboro — ĉie kaj en ĉio;

— sentace eduki memdisciplinon kaj batali por pli alta kaj severa disciplino — discipli-

no labora, disciplino teknologia, disciplino financa, disciplino plana.

La slogano, kiun ni levis kiel devizon dum la antaŭkongresa laboro „Faroj, faroj kaj nur faroj!“, fariĝu devizo ankaŭ de la laboro por plenumo de la decidoj de la Dekdua Kongreso!

Kamaradinoj kaj kamaradoj,

La Dekduan Kongreson ĉeestis kiel niaj karaj gastoj 125 delegacioj de komunistaj, laboristaj, socialistaj, naciliberigaj kaj aliaj progresemaj partioj kaj movadoj el ĉiuj kontinentoj. Ni dankas ilin por la partopreno kaj subteno, por la bonaj vortoj, adresitaj al la Bulgara Komunista Partio kaj Popola Respubliko Bulgario. Ilia alta pritakso pri ni estas ne nur amika dankesprimado, sed ankaŭ potenca internacia impulso en la nuntempa kaj estonta konstruado de la socialismo en nia patrujo.

Mi petas vin, karaj batalokamaradoj, transdoni al viaj partioj, organizaĵoj kaj estraroj, ke la Bulgara Komunista Partio ankaŭ estonte sendevie kontribuos al fortikigo de la reala socialismo ĉe ni, por unuigo de la internacia komunista kaj laborista movadoj; por evoluigo de la tutmonda revolucia procezo kaj la batalo por socia progreso, por demokratio kaj socialismo, triumfo de la paco sur la Tero.

Gekamaradoj,

De la tribuno de la Dekdua Kongreso kaj en la nomo de ĉiuj delegitoj ni adresas nin al ĉiuj komunistoj, al nia tuta popolo:

Al laboro, karaj gekamaradoj, al laboro, karaj samlandanoj! Ni realigu la decidojn de la Kongreso, ni faru novan, grandan paŝon en la konstruado de disvolvita socialisma socio ĉe ni, en la altigo de la popola bonŝtato, en la plua prosperado de Popola Respubliko Bulgario!

* La konkludan paroladon ni publikigas kun mallongigoj.



PROGRAMO PRI PATRIOTISMA EDUKADO



Kvara etapo de longdaŭra programo por altigo de la rolo de l'arto kaj kulturo por la ĉiŝlanka kaj harmonia evoluigo de la individuo kaj la socio estas la ĉi-jara plenumo de la programo „Konstantin — Kiril Filozofo“. En la ĝisnuna programserio, kiu malkovras la potencon de la homa spirito, enkarnigita en la plej talentaj homoj, tio estas la unua granda manifestajo de tiu speco, per kiu Bulgario prezentas unu el siaj titanoj de la kulturo.

Dum tiu etapo unuajfoje en la laboro por la longdaŭra programo unuigas la fortostreĉoj de la tuta intelekta sfero en nia lando — kul-

turo, scienco kaj klerigo. La kaŭzo de tio estas kiel la temo mem, tiel ankaŭ la koincido de la etapo „Konstantin—Kiril Filozofo“ kun la celebrego de la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato. La ĉefa celo estas stimuli la strebadojn de niaj nuntempuloj al krea evoluo, sencigante kaj popularigante per la rimedoj de arto, scienco kaj klerigo la personecojn kaj la faron de la fratoj Kiril kaj Metodij kaj ties disĉiploj.

La plenumo de la programo kontribuas ankaŭ al stimulo de la sento de nacia fiero pro la faro de Kiril kaj Metodij, postlasinta daŭran spuron ne nur en la slava, sed ankaŭ en la tutmonda kulturo.

Tri fundamentaj projektoj karakterizas la programon. „Unuaj instruistoj“ nomiĝas la projekto, kiun rekte oni dediĉas al la personeco kaj la faro de la du fratoj. La dua projekto — „La disĉiploj“, malkovras la spiritan heredaĵon de la lernantoj de Kiril kaj Metodij, dediĉintaj sian energion al la apostola misio por firmigi kaj altigi la bulgaran kaj la slavan memkonscion. Kaj la projekto „24a de majo“ portas la ideon pri kontinueco de la faro de Kiril kaj Metodij tra la jarcentoj kaj pri ties rolo en la tutmonda kulturo.

KONSTANTIN-KIRIL FILOZOFO — FONDINTO DE LA SLAVA KULTURO KAJ UNUECO

PROF. IVAN DUJČEV

Se ekzistus senmorteco — en historia, ne en abstrakta senco — la nomo de Konstantin—Kiril Filozofo estas senmorta, ĉar senmorta estas la kreita de li slava skribo. En la historio de la bulgara popolo kaj ĝenerale de la tuta slavaro la naŭa jarcento estas vera returna epoko en la evoluo de la kulturo. Mortinta apenaŭ 42-jara, en la disfloro de sia vivo, Konstantin—Kiril ricevis pro sia literatura kaj kleriga agado justan rekonon jam de siaj samtempuloj. Ne estis forpasintaj eĉ tri kvinjaroj post lia morto (la 14-an de februaro 869), kaj pri li estis verkita detala biografio, verŝajne de lia unua lernanto — posta episkopo Kliment de Ohrid, en kunlaboro kun lia frato Metodij. Tiu ĉi Vasta Biografio laŭ formo kaj enhavo spegulas plej elokvente la grandegan respekton al la personeco kaj la faro de Konstantin—Kiril.

Naskita en Tesaloniko en 826 aŭ 827 jaro kiel filo de bizancaslava familio, Konstantin konis de sia infanaĝo la slavan lingvon. La bizanca imperiestro Mihail III (842—867) sendis kiel misiistojn la du fratojn Konstantin—Kiril kaj Metodij al la grandmoravia princo Rostislav. En sia naskiĝurbo la sciama Konstantin studis ĝis perfekteco ankaŭ la literaturan grekan lingvon. Sub la influo de la tiutempe eminenta verkisto Grigorij Bogoslov la juna Konstantin faris siajn unuajn paŝojn sur la kampo de la literaturo. Jam en siaj fruaj jaroj la talenta junulo el Tesaloniko troviĝis sub la bizanca kultura kaj asimila politiko. Tre juna li estis alirita al la ĉefurbo por studi en la lernejo de kelkaj el la plej elstaraj reprezentantoj de la tiama klereco. Liaj instruistoj estigis la tre klera posta patriarko Fotij, kiu dufoje estris la

eklezion en Konstantinopolo (inter 858—867 kaj 877—886), kaj la famekonata Leo Matematikisto kaj Filozofo. En tiu ĉi supera lernejo Konstantin studis la bazajn sciencojn de la tiama klereco: la antikvan grekan poezion kaploke kun Homero, gramatikon, retorikon, aritmetikon, astronomion, muzikon, dialektikon kaj la „tutan filozofian sciencan“.

Pro sia vasta intelekta kulturo kaj morala vivo Konstantin estis distingita per la honora alnomo Filozofo. Li estis promociita en rango de sekretario de la patriarkio kaj poste sendita en kelkaj respondecaj politikaj kaj ekleziaj misioj — al la araboj en 855—856 kaj al la hazaroj je la fino de 860 kaj en la komenco de 861. Responde al la peto de la grandmoravia princo Rostislav li estis sendita kune kun sia frato al la Grandmoravia Princlando kiel „instruiston“ kaj slavan kleriganton, kaj per tio ekestis decida ŝango en lia tuta agado.

Jam en la mezo de la naŭa jarcento ĉe Konstantin maturiĝis la ideo dediĉi sin al la misiista kaj kleriga agado inter la slavoj. Se oni akceptas la ateston pri tio, ke li kreis la slavan alfabeton kelkare antaŭ la grandmoravia misio en 862—863, estas tute logika la konkludo, ke li, helpe de sia frato Metodij kaj de kelkaj siaj lernantoj, preĝis por kristaniga agado inter la slavoj kiel en la Bizanca Imperio, tiel ankaŭ ekster ĝiaj limoj.


La kreo de alfabeto konforma al la slava parolo kaj literaturo, fiksita per tiu alfabeto, prezentis ĝenerale por la slavaro necesan bezonon. Aparte akre tiu ĉi neceso sentiĝis en la vasta kaj bone organizita tiama bulgara

ŝtato. Alfabeto estis necesa por administraj kaj fiksj bezonoj, por enlistigo de militistaj nomaroj, por celebros de eventoj kaj nomoj de hanoj kaj militestroj.

Kun genia penetremo kaj uzante siajn riĉajn lingvajjn konojn, Konstantin Filozofo kreis alfabeton por la lingvo de la slavoj, konatan sub la nomo „glagolica“. Per la helpo de tiu ĉi alfabeto li tradukis en la lingvon de la slava loĝantaro ĉirkaŭ Tesaloniko la bazajn ekleziajn librojn. Pere de la tiel kreita literaturo la dialekto de tiu slava loĝantaro fariĝis la unua literaturo slava lingvo, kiu ĉe la ekzistanta tiama komuneco inter slavaj popoloj kaj lingvoj baldaŭ estis akceptita kiel tutslava literaturo lingvo. La restado de la fratoj kaj de ties unuaj lernantoj en daŭro de kelkaj jaroj — inter 863 kaj la aŭtuno de 867 — en la grandmoraviaj kaj panoniaj regionoj pliriĝis kaj konformigis la faritan de Konstantin Filozofo kolosan kulturen reformon en la vivo de la tuta slavaro.

La malapero de Konstantin—Kiril kaj de ĉefepiskopo Metodij (mortinta en aprilo 885) estis sekve de kruelaj persekutoj kontraŭ iliaj lernantoj kaj adeptoj. La tuta ilia afero estis starigita antaŭ plej peza minaco. Multaj aliaj adeptoj estis venditaj kiel sklavoj sur la vendoplacoj de Venecio. La plej granda grupo—frunte kun Kliment kaj Naum—direktis sin trans Danubon al la bulgara teritorio kaj estis plej kore akceptita en la tiama bulgara ĉefurbo Pliska.

Bulgario savis la aferon de Kiril kaj Metodij por sia kulturo, por la kulturo de la tuta slavaro kaj de la eŭropa kontinento.





E-grupo (Pleven) plenumas riĉan recit-muzikan muntaĵon

(El kovrilpaĝo II)

Kortuŝa estis la prezentado de la junaj talentoj. Ekde frumateno ĝis malfrua vespero oni deklamis, kantis, oratoris — grupe aŭ individue. El ĉiu plenumo ŝprucis arda junula entuziasmo, ambicio montri laŭeble plej bonan artan majstrecon kaj senriproĉan prononcadon en E-o. Ĉiu plenumanto manifestis la strebon prezenti honore kaj digne ne nur sin mem, sed ankaŭ sian loĝlokon. Tiom da emociaj plenumoj de infanoj, lernantoj, junuloj —

kaj ĉio en Esperanto! . . Kompreneble, abundis ankaŭ gajaj renkontigoj, amuzoj, dancoj. . .

Sed la plej grava rezulto, la plej granda sukceso estis la manifestigo de pura patriotismo, de amo kaj fideleco al nia althumana socialisma idealo, al la paco kaj la internacia amikeco, al nia kara lingvo Esperanto, kiu ligas nin kun ĉiuj homoj de bona volo en la tuta mondo. . .

Ĉi-sube ni donas la parolon al iuj el la membroj de la ĵurio.

Belka Beleva, aktorino:

La verkoj de niaj klasikuloj Vazov, Botev, Vapcarov, de Hanĉev kaj Gagarov, de niaj E-poetoj kaj tradukistoj formis la repertuaron de la belarta parolo. Bonege! Tio estas la vera vojo — altnivela materialo. Bedaŭrinde la prilaboro de tiu materialo ofte estis ne la ĝusta, ne la vera. Ekzemple „Kredo“ de Vapcarov sonis kelkfoje preskaŭ kiel amuza versaĵo. Iuj forgesas, ke pro tiu ĉi kredo la poeto estis palmortigita.

La prononcado de multaj recitantoj estis ofte malĝusta — oni elparolis la versojn silabe kaj tial estis aŭdebla nur „recitado“, sed ne logika penso kaj melodio samtempe. Apartaj sonoj ankaŭ suferis: malklaraj vokaloj O kaj A (marŝas anstataŭ marŝas, volu anst,

volo k. a.), treege mola aŭ tre malmola L, socialismo anst. socialismo, malĝustaj akcentoj (pli forte, anst. pli forte, por ke, anst. por ke, akcento sur prepoziciojn al, de, sur aŭ sur la artikolon la k.a.). Pro deziro klare prononci, iuj artikulaciis tiel forte, ke estis perdita la natureco de la parolmaniero.

La muntaĵoj ne ĉiam atingis veran belartan formon. „Muntaĵo“ tute ne signifas preni unu aŭ kelkajn versaĵojn kaj distribui la tekston al kelkaj recitantoj.

Do, estis mankoj kaj eraroj en la recitado de niaj infanoj kaj junuloj — jes. Tamen ili ĉiuj parolis kaj kantis pri Bulgario, pri la heroeco de la bulgara popolo, pri sia feliĉa infaneco. Kaj ili ĉiuj parolis kaj kantis en E-o. Tio plenigis la korojn per gojo kaj fiero.

Jam estas tempo fari seriozajn konkludojn. Mi atentigus nur pri kelkaj mankoj.

Multaj partoprenantoj preparis sin solaj. Ne manifestiĝis sufiĉa enrigardo en la verkojn, kompreno, fantazio, taŭga elekto kaj profito de la belartaj rimedoj. Ni aŭdis ekzemple plenumon de „Kanto pri paco“, kvazaŭ ĝi estus dormiga kanto. La malmultaj esceptoj faris bonan impreson, ekzemple en la kanto pri la frenezulo, kiu konstruas domon sur sablo, la infanoj per manoj bone bildigis la konstruadon de la domo, la pluvon. Simple, sed ĝustatone kaj belarte kantis la pioniroj el Gabrovo. La plimulto de la programo estis ne recitata, sed simple dirita, ne arte plenumita, sed simple kantita.

Kelkaj kolektivoj ne estis bone ordigitaj sur la scenejo. Individuaj plenumantoj ne okupis la plej taŭgan lokon, plenumis siajn programojn malproksime de la mikrofono. Multaj versaĵoj kaj kantoj ne estis trafite elektitaj, ne respondis al la ago kaj voĉo de la plenumantoj. Ofte regis grizeco. Tio koncernas antaŭ ĉio la kolektivojn. Kelkaj muntaĵoj (el Haskovo, Madan, Rudozem, Tărgoviște, Smoljan, Velingrad, Plevn, Stara Zagora, Sofio k.a.) kaŭzis bonan vigligon de la programo.



Deklamas M. Šekerova (Pazarĝik) — 1 premio

Bone preparis sian repertuaron la studentoj el Blagoevgrad, la junulinoj el Petriĉ, la ĝejunuloj el Botevgrad k.a.

La sukceso de ĉiu afero dependas grandskale de la organizo. Se la plenumoj estas amatoraj,

la organizado ne havas pravigon esti amatora. Ĉu ni ĝustatempe komencas la preparon por tia granda manifestacio de E-o? Kial la konatigvespero estas nur simpla, tute ordinara dancvespero? Venas centoj da ĝejunuloj, kiuj nenion aŭdas pri E-o. Ĉu en tiu vespero sperta oratoro ne povus diri kelkajn vortojn pri E-o? Ĉu per kelkaj kantoj altnivela kantisto ne povus manifesti la belsonecon de la lingvo kaj tiamaniere doni imitindan modelon al la junularo?

Multon ni devas fari, ke la Revuo estu altnivela kultura aranĝo. La sukceso dependas de ni. Nur de ni!

Kunĉo Vălev, prezidanto de la jurio:

La jurio tre serioze faris siajn prijuĝojn. Ĉefis tri elementoj: temo, lingvo, arto.

Tutan tagon (10 horojn!) la jurianoj stoeke eltenis sidi sur sama loko, atente aŭskulti kaj observi, juste prijuĝi. Ĉirkaŭ 500 infanoj kaj junuloj pasis tra la scenejo kun pli ol 100 programeroj!

Aparte ĝojigas la fakto, ke sur la scenejo aperis junaj e-istoj ne nur el urboj kaj urbetoj, sed ankaŭ el vilaĝoj. Tiurilate la infanoj el v. Koilovci (distrikto Plevn) kaj v. Dălboki (distrikto de Stara Zagora) donis bonan ekzemplon. Tio parolas pri kreskanta disvastiĝo de E-o ankaŭ en niaj vilaĝoj.

Jam maturiĝas la kondiĉoj por decide plialtigi la nivelon de nia E-festivalo. Tiurilate mi ŝatus fari kelkajn atentigojn kaj rekomendojn.

La Revuo ne estas afero nur junulara, sed ĝi reprezentas antaŭ la socio nian tutan Movadon. Sekve pri ĝia preparo, programo kaj okazigo devas zorgi ne nur la Junulara Sekcio, sed pli intime ankaŭ la Centra Estraro.

Tute malbona kaj eĉ malutila estas la ĝisnuna praktiko prepari sin sola aŭ nur sub la ne ĉiam kompetenta gvido de instruisto aŭ E-aktivulo. Oni devas meti finon al la primitivismo! Dum la preparado oni nepre serĉu la helpon de artisto, reĝisoro, muzikpedagogo, bona lingvisto.

Jam maturiĝas la bezono antaŭ la nacia Revuo okazigi en 2—3 lokoj regionajn revuojn kaj tie selekti la plej bonajn kandidatojn por la nacia revuo. Tiamaniere oni engaĝos kelkoble pli da infanoj kaj junuloj en la amatora arto. Samtempe vekigos pli da ambicio ĉe la kandidatoj prepari sin laŭeble pli bone por gajni la rajton partopreni la nacian revuon.

Ĉe la Revuo en Pazarĝik renaskiĝis malnova formo de la parolarto — la oratora konkurso. Vere ĝin partoprenis nur 3 personoj, sed estonte ni devas instigi pli da kandidatoj. La oratora konkurso estas tre bonefika agadformo por stimuli kaj eduki lertajn agitanojn kaj propagandantojn de nia afero.



Junaj talentoj manifestiĝas

◀ Recitas Gr. Filipova (Pazarĝik) — I premio

LA PREMIITOJ

EN LA NACIA REVUO DE LA E-PAROLO KAJ KANTO

INDIVIDUAJ

1—4 klasoj

Recitado

- I Milka Ŝekerova — Pazarĝik
II Ljubomira Velkova — Sofio
III Tatjana Vrabceva — Burgas
Kuragiĝa — Ljubomira Budinova — Velingrad

Kantoj

- I Vladislava Atanasova — Plevan
II Irena Ivanova — v. Koilovci, distrikto de Plevan
Kuragiĝa — Janka Kaneva — Gálábovo

5—8 klasoj

Recitado

- II Elena Rumjanova — Petriĉ
Darinka Radenkova — Svogo
III Teodora Dunčeva — Sofio

Kantoj

- I Sofija Kostova — Petriĉ
II Penka Vasileva — Sofio
Kuragiĝa — Válcó Savov — v. Dálboki, distrikto de Stara Zagora

9—11 klasoj

Recitado

- III Gjulhan Musa — Tolbuhin
Kuragiĝa — Zdravka Boeva — Gabrovo

Kantoj

- II Snejina Marinova

18—35-jaraj

Recitado

- I Grozdenka Filipova — Pazarĝik
Magdalina Georgieva — Pazarĝik
Nastanka Angova — Blagoevgrad
II Mariana Elenova — Sofio
Rada Lazarova — Burgas
Rajnička Kalojanova — Sofio
III Várbinka Ignatova — Botevgrad
Stamenka Dimitrova — Botevgrad
Slavka Minčeva — Nova Zagora
Kuragiĝa — Angel Kánčev — Jambol

Kantoj

- I Balina Kasámska — Smoljan
II Emilija Šarkova — Velingrad
III Mirela Šipeva — Velingrad

KOLEKTIVAJ

5—8 klasoj

- I E-horo en akompano de blovorkestro — Velingrad
III E-grupo — v. Dálboki, distrikto de Stara Zagora
E-grupo — Gabrovo
Kuragiĝa — E-grupo — Čepelare

9—11 klasoj

- II E-grupo — Petriĉ
Kuragiĝa — E-dueto — Ruse

18—35-jaraj

- I Ensemblo por politika kanto — Blagoevgrad
II Studenta horo — Blagoevgrad
E-grupo — Velingrad

KOLEKTIVA MUNTAJO

1—4 klasoj

- I E-grupo — Plevan
II E-grupo — v. Koilovci, distrikto de Plevan

5—8 klasoj

- I E-grupo — Sofio
II E-grupo — Madan
E-grupo — Targovište
E-grupo — Haskovo
III E-grupo — Rudozem
E-grupo — Svogo

- Kuragiĝa — E-grupo — Plovdiv

18—35-jaraj

- II E-grupo — Smoljan
III E-grupo — Botevgrad

ORATORIA KONKURSO

- I Evelina Mineva — Sofio
II Elena Stojkova — Burgas

GRANDAJ UNUAJ PREMIOJ DE LA REVUO:

- Grozdenka Filipova
Magdalina Georgieva — senpaga partopreno en inter-
Nastanka Angova — nacia E-arango
Balina Kasámska

JUĜKOMISIONO:

- Kunčo Válev (prezidanto), Belka Beleva, Dimităr Denčev, Marija Angelova, Rosica Georgieva.

DISKUTO PRI ORGANIZA AGADO

La Urba Estraro de BEA okazigis fine de marto plenkunsidon dediĉe al la organiza agado.

En sia raporto la prezidanto de UE de BEA Hristo Kanev analizis la organizan laboron de dek tri sofiaj E-societoj. Li emfazis la regulan organizan vivon de la societoj „Maksim Gorki“, „Heroldo“, „Prospero“, kaj „D-ro L. L. Zamenhof“. Estis indikitaj ankaŭ iuj mankoj en la agado: malpliigo de la membronombro, nesufiĉe kontinua kaj vigla organiza laboro, iomete utiligo de la eblecoj pri kunlaboro kun Patrolanda Fronto, kulturdomoj, virinoj, abstinencula movado k.a.

Sekvis diskutoj pri la farita raporto. Estis tuŝitaj gravaj demandoj de la organiza agado — disvastigo de E-o en la lernejoj, oficiejoj kaj produkciejoj, firmigo de la laboro kun la veteranoj — esperantistoj, pli vasta informado pri E-o en la amaskomunikiloj kaj pli vigla kursa agado.

Oni akceptis la buĝeton por 1981 kaj planon pri la organiza agado.

Estis disdonitaj membrokartoj al E-veteranoj.

Haim LEVI



«INTERNACIA JURNALISTO» APERAS REGULE

„Internacia Journalisto“, organo de Tutmonda Esperantista Journalista Asocio (TEJA), jam aperas regule. En la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ ni ricevis la n-ro 1—2/1981, kun interesa enhavo: krom la ĉefartikolo de la konstanta kunlaboranto de „Internacia Journalisto“ N. Danovskij, titolita „Unesko kaj E-jurnalismo“, ankaŭ la „Alvoko de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco“, la artikoloj: „La monda parlamento de la popoloj por paco — forumo de la grandaj esperoj“ de Dimitar Haĝiev, publicisto, delegito de la Parlamento, „Ronda Tablo de jurnalistoj“ de Violin Oljanov, ĉefredaktoro de revuo „Paco“, „Sporto kaj paco“ de Nikola Aleksiev, kun-

redaktoro de „Internacia Journalisto“, jurnalista veterano, portanto de honordiplomo kaj medalo „Julius Fuĉik“ de la Internacia Organizaĵo de Journalistoj (IOJ), „El la Stokholma kongresa E-rezolucio“, organizaj jurnalistaj materialoj, fotoj, informoj, sciigoj k.a.

Adreso de „Internacia Journalisto“: Ivan Kere-midĉiev, Esperov (ĉefredaktoro), kv „Borovo“, bl. 219, vĥ. 3, 1680 Sofia, Bulgario. Kunredaktoroj de „IJ“ estas ankaŭ la spertaj jurnalistoj-veteranoj Nikola Aleksiev kaj Krăstju Karucin.

Ciu jurnalistoj, korespondanto, publicisto-esperantisto devas esti membro de la faka TEJA kaj ricevi ĝian organon „Internacia Journalisto“.

RUSE Solena kunveno kun raporto de G. Naĉev okaze de la 1300-jara jubileo de Bulgario, salutparoloj de la sekretario de BEA Dimitar Papazov kaj la eksterlandaj gastoj: riĉa belarta programo; gaja interkona vespero kun muziko kaj dancoj; koope-rativa kunveno.

Tiuj estis la ĉefaj eroj de la ĉi-jara PARE la 11—12 de aprilo, kiun partoprenis 225 e-istoj el Bulgario kaj gastoj el GDR kaj Hungario.

KAZANLĀK. La 13an de marto E-societo „Roza Valo“ celebris la E-veteranojn P. Nestorov (82-jara), M. Edrev (80-jara) kaj Ĥr. Enev (80-jara).

Junpioniroj emnangis al la jubileuloj florojn kaj librojn.

La solenaĵo finiĝis per profunde emociitaj dankes. primoj de la E-veteranoj.

KUNVENO PRI APRILŬ 1956

La 15an de aprilo la Sofia E-societo „M. Gorkij“ organizis kunvenon dediĉe al la historia Aprila Plenkunsido de BKP en 1956.

Prelegon pri tiu grava evento faris prof. Vasil Coĉov. Kompletigis la prelegon per tralaj eldiroj Violin Oljanov, prof. d-ro Stojan Ĝugev, Kune Vălev. Ĉiuj substrekis, ke la Aprila Plenkunsido malkovris novan etapon en nia sociopolitika vivo.

Ege gravan influon ĝi havis ankaŭ sur la E-movadon en nia lando. Post kelkaj stagna periodo ĝi revigliĝis kaj disfloris. La saman jaron okazis impona kongreso de BEA en Sofio. Kun rapidaj paŝoj la Movado ekmarŝis antaŭen. Nun ĝi estas tute pozitive taksata faktoro en la socia kaj kultura vivo de nia Popola Respubliko.

B. DOJĈINOVA

AMIKA E-RENKONTIĜO EN URBO RILA

Pasintjare la 22an de marto en v. Porominovo, distrikto de Kjustendil, okazis bela E-renkontiĝo. Ĉi-jare la arango ripetigis en u. Rila. Venis e-istoj el Blagoevgrad, Kjustendil, Sofio, Porominovo. Salutparoladon al la ĉeestantoj faris k-do K. Vălev — ĝenerala sekretario de BEA.

Oni kolektive tagmanĝis kaj amike pasigis kelkajn horojn.

La partoprenantoj decidis, ke tia printempa regiona renkontiĝo de e-istoj el la Rila-regiono fariĝu tradicia — ĉiam je la 22a de marto. La programo de la renkontiĝo variigu kaj riĉigu per kunveno por interŝanĝo de sperto el la E-laboro, per ĉekurso al Rila — monaĥejo k. a.

M. ORKOVA

MARE 81 — VARNA

Ĉi-jare en Varna por tria fojo okazos Mara Amika Renkontiĝo Esperantista la 20—21 de junio.

Programo:

20. VI. 9a horo: pedagogia konferenco por kursgvidantoj kaj profesiaj instruistoj.

17a horo: solena malfermo de MARE.

19.30 horo: interkona vespero. Bankedo.

21. VI. 9a horo: ĉekurso.

Kotizoj: 7 lv. por bankedo, 2 lv. por trakto. Aligo: ĝis la 10a de junio.

Korespondadreso: 9000 Varna, p. k. 11, Stanko Stankov. Telefono (post 18 horo): 3-54-76 (Markova).

STARA ZAGORA.

— Paŝoj al organiza stabiliĝo;

— Variaj programoj de junularaj sekcioj ĉe la E-societoj;

— Praktikado de E-o dum ĉekursoj kaj amuzoj;

— 17 E-kursoj en la distrikto;

— manko de sufiĉe da spertaj kursgvidantoj.

Tiuj estis la ĉefaj punktoj de la raporto de J. Kolev pri la organiza stato de la Distrikta Estraro, farita en plenkunsido je la 29a de marto.

Petko Bonev, vicprezidanto de DE, raportis pri la kursa agado. Li emfazis, ke la plej grava tasko estas la perfektigo de la kursgvidantoj kaj ties diplomigo. La 4an de junio okazos en Kazanlak regiona pedagogia E-konferenco.

Oni aktive partoprenis la diskutadon. Estis faritaj interesaj kaj utilaj proponoj. La partoprenantoj akceptis rezolucion pri estonta agado.

ŜUMEN. La lokaj e-istoj havas multajn amikojn en la vasta sovetlanda. Multjara kaj kora amikeco ligas ilin kun e-istoj el Leningrado, Kiev, Ĥerson, Kutaisi, Maĥackala kaj aliaj urboj.

En la tago de malfermo de la XXVI kongreso de KPSU oni organizis vesperon dediĉe al la sovetaj amikoj. Canko Murgin, instruanto en la Supera Pedagogia Instituto, parolis pri la historio de Komunista Partio de Sovetunio kaj pri la sukcesoj de la sovetaj homoj. Multaj el la ĉeestantoj voĉlegis leterojn de siaj sovetaj amikoj-esperantistoj, rakontis pri la renkontiĝoj kun ili.

Cvjetko TODOROV

BOTEVGRAD. Antaŭ nelonge E-societo „Trifon Ĥristovski“ okazigis jarkunvenon. Gastoj estis d-ro Stojan Moraresku kaj Zahari Ivanov el la Centra kaj Distrikta Estraroj de BEA.

Raporton pri la societa agado faris la viceprezidanto Vanko Bărdarov. Sekvis vigla diskutado.

Zahari Ivanov klarigis la taskojn, starantajn antaŭ la societo, kaj parolis pri la sociopolitika signifo de la E-movado en Bulgario.

Oni aprobis agadplanon de la societo.

Estis akceptitaj 23 novaj junaj membroj.

LITERATURA KONKURSO

TRIA Internacia Literatura Konkurso de Madrida Esperanto-Liceo.

Estos kvar branĉoj:

a) Prozo, originala en Esperanto, minimume 2 000 vortoj.

b) Poezio, originala en Esperanto.

c) Eseo, libera temo, originala en Esperanto.

d) Traduko de hispana proza verko en Esperanton, minimume 2 000 vortoj.

La limdato por akcepto de konkursaĵoj estas la 1-a de oktobro 1981.

Oni sendu originalon kaj kvar kopiojn, kun la pseŭdonimo de la aŭtoro.

En fermita koverto estu skribita ekstere la pseŭdonimo kaj interne la vera nomo kaj adreso de la aŭtoro.

Konkursajojn sendu al: Madrida Esperanto Liceo (por la Literatura Konkurso), c/Atocha 98, 4., Madrido-12, HISPANIO

En la disfloro de la bela printempo — la 5an de majo k. j. — nia amiko kaj juna aktivulo

BRANIMIR KUNĈEV VĂLEV

(20-jara)

tragike forpasis en plenumo de sia soldata devo en la vicoj de la Bulgara Popola Armeo.

Adiaŭ, kara Brani! . .

ADA — ĈIAM VIVANTA

Nekredeble! Subite! Sen iu ajn malsanado — la koro, kiu tiel vigle batis 89 jarojn, ĉesis pulsigi la 23an de marto. . . Atanas Dančev Atanasov — ADA, unu el la plej eminentaj figuroj de la bulgara E-movado, ne plu es-



tas en niaj vicoj. . . 75 jarojn li marŝis en ĝia frunta kolono, ĉiam intime ligita kun ĝiaj gojoj kaj malĝojoj, kun ĝiaj venkoj kaj malvenkoj, kun ĝiaj festoj kaj krizaj momentoj. Ekportinta jam de sia 13-jara aĝo la grandan amon al la internacia lingvo E-o kaj la idealoj de la e-istoj pri paco kaj internacia amikeco, ĝis sia lasta spiro li restis al tiu amo fidela. Tio de si mem elokvente parolas pri la grandeco de lia menso, pri la nobleco de lia karaktero.

Gimnaziano, jam arda adepto de E-o, Atanasov skribas sian unuan leteron al d-ro L. L. Zamenhof kaj ricevas respondon de li. En siaj rememoroj li skribas pri tiu gravega momento en sia vivo: „ . . . Mi eksentis, ke ĉie sur la tero vivas homoj, kiuj amas tion, kion mi amas. . . kaj jen ni formas unu tuton, ni apartenas al unu rondo. Forta brilo eklumis en mia vivo. . . Tiu tago ŝajnis al mi granda festo. . . Nenio en la mondo plu povis min demeti de E-o“.

Kiel studento en la Sofia Universitato Atanasov iniciatis kaj kune kun Panajot Kolev kaj Kamen Kamenov fondis Studentan Esperantistan Grupon — la unuan en nia lando. Sed li laboris ankaŭ en la civitana E-grupo en Sofio. Samtempe li estigis reprezentanto de la Universala Studenta Unio por Bulgario.

En 1911 Atanasov estis elektita sekretario de la Bulgara Esperantista Ligo kaj disvolvis ege fruktodonan agadon por E-o en la ĉefurbo. En 1912 li sukcese invitis la faman bulgaran

scienciston prof. Ivan Siŝmanov paroli pri la problemoj de internacia lingvo en publika kunveno. La prelego de la eminentulo okazis en granda aŭditorio de la Universitato kaj estis vizitita de multnombra publiko el studentoj kaj civitanoj. Brila sukceso! Tuj oni eldonis ĝin broŝurforme sub la titolo „Cu estas ebla kaj necesa internacia helpa lingvo“. Tiu broŝuro eniris en la oran fonduson de la bulgara E-movado. La senrezerve pozitiva rilato de prof. Siŝmanov al la planlingvo E-o donis fortan puŝon al la E-movado en nia lando.

Post la unua mondmilito Atanasov farigis unu el la plej elstaraj figuroj de la bulgara E-movado — en diversaj momentoj ĉefredaktoro de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“, vicprezidanto kaj prezidanto de BEA.

Aparte notinda merito de Atanasov en tiu periodo estas la enkonduko de E-o en la bulgarajn mezlernejojn (gimnaziojn) en 1921. Tion li kaj kelkaj aliaj gvidaj personoj de BEA atingis post insistaj klopodoj en la Parlamento kaj la Ministerio de Popola Klerigo. La oficialigo de la instruado de E-o en la gimnazioj estis venko el grandega signifo por la evoluo de la E-movado en Bulgario. Bedaŭrinde la reakciaj potenculoj, venintaj post la puĉo de la 9a de junio 1923, nuligis tiun venkon en 1924.

Kian rekonon kaj aŭtoritaton ĝuis Atanas D. Atanasov — ADA dum tiu periodo parolas elokvente la sekvaj versoj, flugantaj de buŝo al buŝo:

„En la centro de la centro
estas nia ADA —
homo grava, ege rava,
koro de l'movado“.

Sed Atanasov ne estis nur talenta organizanto de la E-movado. Li estis ankaŭ ĝia



A. D. Atanasov kun sia fratino

elstara teoriulo. Posedante brilajn erudiciojn kiel filologo li profunde traktis multajn problemojn de E-o kiel lingvo, gramatiko kaj stilo. Al lia plumo apartenas centoj da prilungvaj artikoloj kaj lernolibro kelkfoje reeldonata, laŭ kiu lernis multaj generacioj de bulgaraj e-istoj. Li estas kunaŭtoro de „Bulgara-Esperanta vortaro“. Al li apartenas ankaŭ kelkaj libroj pri la bulgara E-movado: „Rememoroj de esperantisto“, „El la vivo de la verdurbaj esperantistoj“ k.a.

Li fervore tradukis en E-on la klasikulojn de la bulgara literaturo kaj popularigis ilin en eksterlando. Modela restis lia traduko de „La familio Gerak“ de Elin Pelin.

Delonge la rekonon de ADA kiel lingvisto transpaŝis la limojn de nia lando kaj en 1963 li merite estis elektita kiel unua prezidanto de la Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj. En la sama jaro li fariĝis membro de la Akademio de Esperanto kaj en 1965 — ĝia vicprezidanto. Tiun lastan postenon li okupis pli ol 20 jarojn — ĝis antaŭ 3 jaroj,

kiam li ekŝigis pro la aĝo.

Pro lia abnegacia kaj elstara laboro por E-o la Universala E-Asocio proklamis lin honora membro de UEA. La Bulgara E-Asocio ankaŭ honoris lin per altaj titoloj — honora membro de BEA kaj elstara lektoro de E-o. Rekonante lian valoran agadon por popularigo de la bulgara literaturo kaj kulturo en eksterlando kaj pro liaj meritoj por disvolvigo de la bulgara kaj internacia E-movadoj la Stata Soveto de Popola Respubliko Bulgario honoris lin per la plej alta kulturordeno „Kiril kaj Metodij“ — ora.

ADA mortis. Sed lia esperantista spirito vivas kaj vivos en niaj koroj: lia amo kaj fideleco al E-o, lia kredo je ĝia hela estonto, lia eksterordinara laboramo, principeco kaj honesto, lia kolosa faro inspiras nin kaj la sekvajn generaciojn al ĉiam vigla kaj sindona laboro por E-o, por la tuthomara progreso, por la internacia amikeco, por la paco.

Kunĉo VÁLEV

MIA NEFORGESEBLA E-PATRINO. . .

Forpasis Hilda Dresen — la „Patrino de la estona E-movado“, la senlaca adepto de la E-literaturo. Mi mem perdis karan amikinojn, pli aĝan fratinon, kiu ĉiam konsilis, konsolis kaj kuraĝigis min per siaj leteroj.

Hilda Dresen naskiĝis je 11/5/1896 en Kolga, Harjuma, Estonio. Ŝi oficis kiel radiotelegrafistino, esperantiĝis en 1913, ektradukis en 1922. Dum sia tuta vivo ŝi prezentadis al la E-mondo estonajn poetojn — pli ol 60 — per arta tradukado de iliaj versaĵoj. Ŝi publikigis el la estona pli ol 120 poemojn, el la rusa — 31, el la germana — 10, ankaŭ el la franca.

Sia granda koro, radio de ŝia bela animo, parte speguliĝas en ŝiaj leteroj al mi.

Por la unua fojo ŝi skribis al mi en 1975, post la apero de mia eseo „La virinoj en la familio de Zamenhof“ en „BE“ n-ro 7—8/1975. Mi estis agrable surprizita kaj tuj kore dankis ŝin.

Ŝi ĉiam malegoisme ĝojis pri miaj kaj alies literaturaj sukcesoj. Jen linioj el ŝia letero de 19/11/1978:

„... Koran gratulon pro la literatura premio! Mi ja ĉiam ricevis „BE“ por legado — do mi sciis pri via laboremo. Ne estas facila la korektista laboro, sed ĝi ja estas treege grava kaj bezonata. Mi deziras al vi plurajn sukcesojn. . .“

Eksciinte pri la celebrego de mia „literatura portreto“ lige kun mia 60-jariĝo, Hilda sendis al mi ĉarman florkarton kun konvaloj.

Hilda Dresen ĉiam kritike legis miajn verkojn kaj ofte korektis min. Jen ekzemple lige kun mia „Promeno en la infaneco“:

„... Mi ĝojus, se vi ŝanĝus ĉe represo en la komenco de via premiita verko „ekhaltis ĉe la stacidomo“ — ne sur la stacidomo. . . En Esperanto „sur la stacidomo“ ne sonas bone, oni tuj imagas, ke sur la tegmento de la domo. Entute oni tre ŝatas uzi „sur“, ekzemple: sur la koridoro, sur la korto — ofte „en“ estas pli logika. Pardonu, ke mi komencis pri malgravaĵoj. . .“

Hilda Dresen ĉiam serioze traktis min kiel verkistino kaj pro tio mi senĝene dividis kun ŝi ĉiujn miajn sukcesojn, senpacience atendante ŝian kuraĝigon.

Ho, kara, nobla Esperanto-patrineto, vi songis pri Marjorie Boulton kaj pri mi, ĉar vi amis kaj estimis nin, kiel ankaŭ ni vin!

Jen kuŝas antaŭ mi la lasta karto de la kara Hilda Dresen — tiu de 16/12/1980. Kvankam grave malsana, ŝi trovis fortojn por skribi: . . . Mi fanfaroni ne povas — la jaro ne estis favora por mi. Iom morna ĝi estis. Mi nun tute ne eliras. . . Multajn sukcesojn en la Nova Jaro! Kore salutas vin: Hilda Dresen.“

Ci-jare ŝi ne ricevis mian „martenicasalutkarton“.

Mi ĉiam memoros la vortojn de Hilda Dresen — mia amata Esperanto-patrino. . .

Rajna KONSTANTINOVA

LA KONSTITUCIO DE PR BULGARIO EN ESPERANTO

Unu salutinda iniciato jam estas fakto — la Konstitucio de Popola Respubliko Bulgario aperis en E-o.

La traduko de la Konstitucio estas modesta kontribuo al la tutpopola impeto por inda renkonto de XII kongreso de BKP. Ĝi estos distribuata al ĉiuj landoj, kun kies E-organizaĵoj BEA havas kontaktojn. La celo estas, ke la e-istoj el tiuj landoj ekkonu la norman bazon de la socialisma leĝeco en Bulgario, la fundamentajn principojn de nia ŝtato kaj soci-ekonomia strukturo.

Ni ĝojas, ke la Konstitucio fariĝos alirebla por la amikoj de Bulgario en tuta mondo.



KONSTITUCIO DE POPOLA RESPUBLIKO BULGARIO

1980

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

VIRINA INTERNACIA RENKONTIĜO

Tiu renkontiĝo estis organizita de la Komisiono pri virina agado (KVA) — Eliza Kehlet, Anna Brennan, Loes Demmendaal — la 28an de februaro kaj la 1an de marto en Rotterdamo. Partoprenis 13 virinoj el Belgio, Bulgario, Francio, Germanio, Nederlando kaj Svedio.

La partoprenantoj pridiskutis kelkajn paraĝojn el la Rekomendoj de la Agadprogramo de UN por la dua duono de la Jardeko de Virinoj, akceptita pasintjare en Kopenhago. La devizo mem de la konferenco: „Egaleco, evoluo kaj paco“ donas la direktojn pri la temo de simila interparolo. Por la esperantista virina agado apartan intereson prezentis la punktoj, kiuj donas eblecon helpi la socian evoluon de la virino akiri propran korean memfidon kaj partopreni aktive en socia, kultura, organiza kaj aliaj agadoj.

Per dek punktoj estis formita bazo por la estonta agado de KVA, de la landaj virinaj komisionoj kaj apartaj esperantistinoj en ĉiu lando.

Por la venonta jaro simila renkontiĝo okazos en Hamburgo (FRG).

La informoj pri la socia stato de la nuntempa bulgarino elvokis denove intereson. Oni

substrekis, ke la ligo inter la Komitato de la Movado de Bulgaraj Virinoj kaj la Virina Komisiono de BEA estas vere realigita kaj bonrezulta. La eldono de revuo „Bulgarino“ en E-o ĝojigas la esperantistinojn. Oni enmanigis al la ĉeestantoj la numeron, dediĉitan al la Internacia Jaro de Infano.

La atento de la dommastrinoj de tiu renkontiĝo estis varma. Ĝi donis al ni ĉiuj la eblecon trankvile labori kaj havi agrablajn amikajn interparolojn.

Por ni, la bulgaraj esperantistinoj, la renkontiĝo starigas seriozajn taskojn: aktive partopreni en la kultura kaj organiza vivo de BEA kaj en la ĝenerala socia vivo en nia lando; bone prepari la partoprenon de infanoj-esperantistoj en la Infana Asambleo en 1982 kun eventuala renkontiĝo de la virinoj, kiuj akompanos ilin; prepari materialojn por celebri de la Internacia Tago de la Virino — la 8a de marto k.a.

La Virina Komisiono de BEA jam havas iujn decidojn, kiujn proponos al la tutlanda reto da virinoj-aktivulinoj por estonta agado.

Belka BELEVA

PER OKULOJ DE INFANOJ

Ekspozicion de infandeseĝnaĵoj aranĝis la Pakomitato de Hungara Esperanto-Asocio en la Budapeŝta Kulturdomo „Jozsef Attila“. La Radio donis tri minutan informon pri la ekspozicio.

Kion komunan havas Esperanto kaj desegnaĵoj? Tion, ke ĉi tiujn desegnaĵojn kolektis kaj elektadis esperantistoj de Pazarĝik el la lernejoj de sia propra urbo kaj el tiuj de kelkaj

ĉirkaŭaj vilaĝoj. La kolektaĵon ili sendis al sia budapeŝta ĝemelgrupo „Egressy“, petante similan materialon intersange. La Pakomitato de HEA transprenis la organizon laŭbore.

La ĉarmaj, naivaj, sed sinceraj pentraĵoj, desegnaĵoj de infanoj 9–14-jaraj ekmovis ankaŭ la korojn de plenaĝuloj.

Eva FARKAS

Literaturo

Artoj

Kulturo

IIIa Premio en la literatura

konkurso de „Bulgara Esperantisto“ — 1980

N. N. ANDRIANOVA

SENMORTA LENIN

Planedojn turnis tiu Hom' al suno,
Titan'. Gvidanto. Filozof'. Tribun'.
Li vojon montras al Estont' el nuno.
Por tuta ter' — simbol' de l'homa jun'.

Al junular' li testamentis:
Studi, studi,
En la teatr' de l'viv'
ne esti nur spektant',
Sur „granda sceno“
nur aktivan rolon ludi,
Estante firma, celkonscia batalant'.

Nin gvidas lia Vero,
granda, aŭdaca,
Por la plej helaj idealoj en batal',
En la epoko nuna,
Storma, mortminaca,
Ĉi sola vivdonanta vero de l'real.
En ĉies kor' honesta

lia nomo
vivas,
Standardo nia
en batal', labor'.
Kiel la maja tondro sonas:
„LENIN“ —

Kaj renovigas teron
kun fervor'.

Kaj ĉiam lia suno ver' aktivas,
Fiero nia kaj eterna glori'.
En ĉies kor'

senmorta Lenin
vivas, —

Al nova
hela
mondo
semafor'...

EKSPOZICIO PRI PACO

Omago al Tutmonda Tago de Junularo la E-Klubo „Horizonto“ en Jurbarkas (Litovio) aranĝos grandan ekspozicion subtitole „La junularo de la mondo en batalo por paco kaj solidareco“.

Ni petas sendi urĝe al ni konvenajn materialojn: afiŝojn, bildojn, fotojn, librojn, revuojn en ĉiuj lingvoj. Ni esperas je aktiva reĝelo de multaj E-klubo kaj organizaĵoj. Al ĉiu sendinto ni recipokos per litova memoraro aŭ rekompencos laŭdezire. Ĉion adresu al:

Abromas Laimundas, 234432 pŝt. PILIS, Jurbarko raj., Litovio — USSR



KONCERTO DE E-KANTARTISTINO

Dediĉe al la 1300-jara jubileo de Bulgario la 4an de marto ĉi-jare en la ĉambra halo „Bulgario“ okazis koncerto de E-kantistino Marija Angelova kun la partopreno de la merita aktorino Gulia Ganeva — pianistino kaj la aktorino Raja Nankova.

La koncerto estis interesa poezi-muzika komponaĵo de bulgaraj aŭtoroj. Ĝi estis plenumita kun bona gusto kaj belarta sento. En la koncerto Marija Angelova prezentigis kiel bonega kantistino kun granda muzikeco kaj lirika agordo de la plenumado. La kantkulturo de Marija Angelova impresas ĉiam. Ŝi posedas sentemon pri la plej delikataj nuancoj, kio permesas al ŝi plene penetri en la bildecan mondon de la plenumataj kantoj. Ligita kun la emocia vivo de la virino, ŝi prezentas la kantenhavon kun subtila komprenemo de ĝia poezia valoro. La mildeco de ŝia tembro kaj la natura facileco, per kiu ŝi kantas, aparte distingigis en la kantoj: „Meseĉinko ljo“ de Dimităr Petkov, „Frua printempo“ de Dimităr Sagaev, „Adiaŭo“ kaj „Falas la arbofolioj“, „Dormu, mia Damjanĉjo“ de Ljubomir Pipkov kaj ario de Marija Desislava el la samnoma opero de P. Ĥaĝiev k.a.

La plenumkulturo de Marija Angelova estas pliriĉigita same per ĝia varia repertuaro, en kiu estas kantoj de Subert, Mocart, Ĉajkovski, Raĥmaninov, Hugo Volf, Stravinski k. a. La kantartistino posedas specialan senton pri la antaŭklasika muziko, kiun ŝi plenumas sindetene kun tre profunda muzika esprim-povo.

La renkontiĝoj kun la arto de Marija Angelova estas ĉiam interesaj kaj dezirataj.

F. FILIPOVA



ĈU EKZISTAS KARAKTERIZA E-KANTO?

(Interjuro kun itala E-kantisto Gianfranco Molle)

„Franca Esperantisto“: Estu afabla prezenti al niaj legantoj vian repertuaron. . .

Gianfranco Molle: — Mi precipe plenumas kantojn, kies muziko estas komponita de mi. Do, temas pri kantoj, kiuj estas preskaŭ ĉiam originalaj. Krome mi havas ankaŭ repertuaron de kantoj plejrapte tradukitaj el minoritataj lingvoj. Mia opinio ne estas celkonforme traduki el lingvoj de ege konataj kulturoj, ĉar ili mem tre sukcese sin prezentas kaj certigas sian disvastigon. Male — la minoritataj kulturoj havas malpli da eblecoj por manifestiĝi efike al pli larĝa publiko. Aŭtoroj de la tekstoj de miaj kantoj estas precipe famekonataj E-poetoj (Baghy, Auld, k. a.), ankaŭ aŭtoroj, kiuj verkis nur la vortojn de la kantoj (Renato Corsetti, Giulio Cappa, Jopetro Danvi).

„F. E.“: — Ĉu via opinio ekzistas karakteriza E-kanto kaj kiam estontecon ĝi havas?

G. M.: — Jes, fakte ekzistas karakteriza E-kanto, plenumata de multaj kantistoj (Le Puil, Tzaut k.a.). Kia ĝi devus esti kaj kie efektive ĝi troviĝas — la tempo montros. Tamen ekzistas favoraj kondiĉoj por ĝia evoluo kaj disvastigo. Tiu procezo havas

sian komencon antaŭ pli ol dek jaroj, kiam aperis la jam estiĝinta famekonata disko „Jen nia mondo“. Ekde tiam oni ekkonsciis la gravecon kaj la signifon de la E-kanto, ĉar antaŭe similaj diskoj estis eldonataj sporade kaj malofte.

„F. E.“: — Ĉu kantartistoj, plenumantaj kantojn en E-o, havas sufiĉe da bonaj kondiĉoj kaj okazoj prezenti siajn verkojn al vasta publiko?

G. M.: — La okazoj estas multnombraj kaj oftaj, ĉar oni aranĝas multajn E-renkontigojn en la tuta mondo. La E-publiko ŝatas veturadi tra la mondo kaj partoprenadi E-aranĝojn, sed unu el la plej gravaj obstakloj estas la altaj veturelspesoj.

„F. E.“: — Ĉu ankaŭ neesperantista publiko favore akceptas kantojn en E-o?

G. M.: Verdire dependas de tio ĉu la aŭskultanto neesperantista neniam havis ian ajn kontakton kun E-o. Ĉar iufoje li akceptas malfacile la plenumatan en E-o kanton, aŭ konsideras la lingvon sonanta strange, aŭ estas ŝokita pro la fakto, ke oni kantas en lingvo, kiu reprezentas nenies teritorion. Sed se la neesperantista spektanto estas anticipi iel informita kaj preparita tiurilate, li plej ofte reagis pozitive kaj konsideras E-on belsona. Plej ofte la sukceso de la spektaklo dependas de la personeco de la kantisto mem kaj de la maniero de ties prezento.

„F. E.“: Gianfranco Molle, ĉu vi estus afabla prezenti al niaj legantoj viajn estontajn planojn, viajn ambiciojn?

G. M.: Eble baldaŭ mi havos la eblecon disponi pri speciala surbendiga ejo. Delonge mi havis tiun ideon kaj eĉ apelaciis pri helpo, ĉar ĝis nun mi estis devigita labori kaj surbendigi ĉe ege malfacilaj kondiĉoj kaj elspezi konsiderindajn monrimedojn. Bedaŭrinde la E-merkato tre malrapide aĉetas magnetofonkasedojn kaj diskojn — ĉu pro distancoj, ĉu pro nescio pri ties aperigo.

Finfine mi realigos mian revon — labori ĉe favoraj kondiĉoj en propra studio kaj atingi altan kvaliton de surbendigo. Tiun ĉi studion mi disponigos ankaŭ al aliaj kantartistoj-esperantistoj por surbendigo de E-komponaĵoj.

El „Franca Esperantisto“, n-ro 325/1980
Esperantigis el la franca: D. S. R.

La karaĵoj legantoj
de „Bulgara Esperantisto“
la ĝidala konleganto
Fajsi Karol
Budapeŝto,
la 20-a de Marto 1961



MIRINDA RIĈAĴO DE E-ELDONAĴOJ

Plurfoje dum miaj vizitoj en Budapeŝto mi preterpasis la pordegon de la domo sur bulvaro Népköztársaság n-ro 27 kun verdstela surskribo „UEA-Delegito“, sed mi ne interesiĝis pri la samideano, loĝanta en tiu domo.

Nur kiam dum la ĉi-jara Generala Kunveno de Hungara Esperanto-Asocio, kies gastoj estis kelkaj fremdlandaj e-istoj, oni invitis nin viziti tiun domon, mi komprenis mian grandan eraron: la loĝejo de nia budapeŝta samideano FAJSZI KÁROLY (KAROJ FOJSI) evidentiĝis vera trezorejo de E-eldonaĵoj el la tuta mondo.

Nia ĝentila dommastro afable enirigis nin en mirinde riĉan kaj precize ordigitan kolekton, kvazaŭ en fortikaĵon de Esperanto: libroj, multaj libroj, en nekutima kvanto por privata loĝejo — ĉiuj ejoj de la planko ĝis la plafono estas plenigitaj per librobretoj...

Jam 71-jara, Karoj Fojsi estas ne tre malnova e-isto (ekde 1963), sed lia kolekto kaj kolektanta agemo, kvankam konataj en fakaj rondoj kaj ankaŭ internacie, estas preskaŭ nekonataj al la amasa publiko.

Ni estis mirigitaj kaj ravitaj de tiu riĉaĵo kaj de tiu sinofera kolektadlaboro, kaj niaj demandoj sekvis unu post la alia.

— Kolekti esperantaĵojn tute ne estas facile, des pli ke ĝi estas multekosta afero. Kiel kaj pro kio vi komencis labori sur tiu ĉi malfacila tereno — metode kolekti?

— Guste la malfacilaĵoj devigis min eklabori. La du mondmilitoj, ĉefe la dua, malaperigis, neniigis multajn esperantajn librojn, periodaĵojn. Ili havas gravan kulturan, kulturhistorian kaj movadhistorian signifon. Mi trovis nenie tian lokon, kie ili estu kune. Eĉ nun ne ekzistas tia ĉe ni. Muzeoj, bibliotekoj ne havigis ilin al si aŭ malbone konservis ilin. Tial mi klopodis akiri, konservi kaj gardi ĉion saveblan...

— Kiel statas nun la kolekto? Kion ĝi enhavas?

— Per kelkaj vortoj: dum preskaŭ dudek

jaroj mi sukcesis kolekti el ĉiuj landoj de la mondo pli ol 4600 librojn — de la unuaj jaroj (la „Unua libro“ nur en faksimila eldono) ĝis hodiaŭ.

Periodaĵoj: proksimume 4000 jarkolektojn. El ili ĉirkaŭ 1000 kompletaj, binditaj, 3000 atendas por esti kompletigitaj. Preskaŭ ĉiun kolekton mi mem bindas!... Estas ankoraŭ manuskriptoj, malgrandaj presaĵoj, afiŝoj, invitiloj, artaj kaj movadaj programfolioj, personaj memoraĵoj de eminentaj e-istoj, fotoj pri personoj kaj okazintaĵoj. Mi posedas valorajn raraĵojn, kiel ekzemple: la Malnovan kaj la Novan Testamentojn, tradukitajn de L. L. Zamenhof, La Koranon (en E-o), la manuskripton de la tradukitaj de Rubljov „Fabeloj“ de Krilov, kaj eldonaĵojn en E-o ankaŭ de via lando. Jen en tiu ĉi angulo (per fieriga gesto k-do Fojsi montris al ni) estas la originalaj skribotablo kaj seĝo de Julio Baghy, kiujn disponigis al mi HEA kiel nedisigebla parto de tiu kolekto...

— Bonvolu diri ion pri viaj ekspozicioj?

— La kolekto mem, kvankam estas je la dispono de ĉiuj esplorantoj, finfine estas dediĉita (krom al mia ĝojo) al servo de la esperantistaro.

Jam de jaroj mia ekspozicio migras de urbo al urbo kaj ne nur propagandas, sed ankaŭ klerigas la vizitantojn. Tiu ĉi ekspozicio konsistas el multobligitaj titolpaĝoj — sur diverskoloraj paperoj, portretoj de esperantistaj eminentuloj, diversaj prospektoj ktp. Multaj grupoj, kulturcentroj, sindikatoj invitas min kaj mi iras...

— Viaj proksimaj kaj foraj celoj, revoj, planoj?...

— Mi jam estas sufiĉe maljuna kaj mi konscias, ke neniuj kolektoj estas tute kompletaj. Pro tio mi daŭrigos mian laboron... Eble iu publika biblioteko transprenos la tuton. Bonvolu transdoni miajn plej varmajn salutojn al la bulgaraj amikoj-esperantistoj.

Donco ĤITROV

Verdaj steloj

Memore al Ljudmila JEVSEJEVA

LA PERDITA BUTONO

Serĉis panjo kaj avino
serĉis avo, mi, onklino,
serĉis senrezulte, vane
surgenue, ambaŭmane.

*

Ve, [de mia jak' butono,
'alperdigis sen pardono.

*

Kiam mi laciĝis tute,
eta frat' signalis mute:
la butonon per la lango
kaŝis li malantaŭ vango.

L. Jevsejeva

INSTRUISTO DEMANDAS, LERNANTOJ RESPONDAS

- Kiom longe vivas la muso?
- Tio dependas de la kato. . .

* * *

- Kion vi scias pri la amoniako?
- Ĝi provokas larmojn.
- Via respondo ankaŭ. . .

* * *

- Kio okazas kun oro, se oni lasas ĝin ekstere?
- Ĝi malaperas. . .

* * *

- Kion vi povus diri pri la kemiistoj de la 19a jarcento?
- Ke ili mortis. . .

* * *

- Kial vi malfruis?
- Sur tabelo antaŭ la lernejo estas skribite: «Rapid a movado malpermesita!»

* * *

- Denove vi faris multajn erarojn!
- Ja vi diris, ke oni lernas el la eraroj!

* * *

KIEL EN LA LERNEJO

Iu instruisto ripozis sur la strando. Neatendite li rimarkis unu el siaj lernantoj kaj demandis lin:

- Kiom profunda estas la marakvo?
- Ĉirkaŭ du metrojn—respondis la lernanto.
- Nu, bone, sidigu! . . .

LA MALHUMILA MAHARAĜO

(Hinda fabelo)

Foje vivis tre malhumila maharaĝo, kiu estimis nenion. Se li ekdezirus ion, oni senprokraste devus tion plenumi. Ve, se iu ne tuj plej honore ovacius lin!

Foje la maharaĝo eliris el sia palaco por viziti la urbon. En la urbo sub tegmenta defluilo de la templo konstruis sian neston tute eta birdo. Ie sur la bazaro ĝi ekvidis perditan moneron kaj ĉar tiu plaĉis al ĝi, la birdeto kaptis la moneron kaj per sia beko forportis ĝin al sia nesteto.

Kiam la malhumila maharaĝo kun sia akompanantaro, korteganoj kaj elefantoj alproksimiĝis, la birdeto flugis alten al la ĉielo kaj komencis laŭte kanti:

Ho, tiom belegan moneron mi havas,
eĉ nia reganto ĝin havi ne povas!

Ĉirkaŭstarantaj homoj ridetis kaj la maharaĝo koleris. Senprokraste li sendis siajn servistojn, ordonante al ili forpreni la moneron de la birdeto.

Post longtempa pelado la servistoj fine forprenis la moneron kaj alportis ĝin al sia regnestro.


Sed la birdeto denove flugis alte kaj kantis:

Por ke nia reganto povu pace vivi,
lastan monereton devis de mi preni!

La homoj denove ridis kaj la maharaĝo koleris. Tuj li ordonis redoni la moneron al la birdeto kaj por pruvi sian riĉecon, li ordonis disjeti monerojn al malriĉuloj.

La birdeto triafoje elflugis alten kaj kriis, por ke ĉiuj aŭdu:

Supervenki min la regnestro ne povis,
timante, moneron li al mi redonis!



Estis du viroj en la strato.
La unua diras: "Estas muŝo sur mia glaciaĵo."
"Jes, diras la alia, tiu ĉi certe ĝuas la vintran sporton".

ЗАЩО КОТКАТА СЕ МИЕ СЛЕД ЯДЕНЕ

(Литовска приказка)

Врабчетата летят около къщите, защото в дворовете винаги има тухлички хляб, ту житни зрънца, които те обичат да ядат.

Веднаж едно врабче подскачаше в двора на една къща, търсейки нещо за ядене. То беше съвсем спокойно и безгрижно. Но видя го гладна котка, приближи се скришом, скокна и го хвана.

Доволна котката рече:

— Сега хубаво ще закуся.

— Какво говориш, високоуважавана котко! — зачурулика уплашено врабчето. — Нима искаш да ме изядеш?

— Защо пък не? Нима трябва само да ти се възхищавам, дори когато съм гладна? — И котката поиска веднага да откъсне главата на врабчето.

— Но не се ли срамуваш, високоуважавана котко? — отново зачурулика врабчето. — Ето, ти още не си се измила. Нима ти, която живееш в къща заедно с хора, не знаеш, че всеки цивилизован човек първо измива ръцете си, а после се храни?

— О, да, това е истина! — отвърна котката и вдигна лапа, за да си изтрие устата.

В този миг врабчето се почувствува свободно, разпери криле и отлетя.

Разгневена котката извика:

— О, втори път няма да ме измамиш! Хората да првят както искат, но аз първом ще ям, а после ще се мия.

Оттогава всяка котка се мие само след ядене.

KIAL LA KATO LAVAS SIN POST MANĜO

(L'tova fab lo)

La paseroj flugas ĉirkaŭ la domoj, ĉar en la kortoj ĉiam estas ĉu paneroj, ĉu greneroj, kiujn ili ŝatas manĝi.

Foje pasero saltetis en la korto de iu domo, serĉante ion por manĝi. Ĝi estis tute trankvila kaj senzorga. Sed vidis ĝin malsata kato, kaŝe proksimiĝis, saltis kaj kaptis ĝin. Kontenta, la kato diris:

— Nun mi bone lunoŝos.

— Kion vi parolas altestimata kato! — ekpepis timigite la pasero. — Ĉu vi intencas formanĝi min?

— Kial do ne? Ĉu mi devas nur admiri vin, eĉ kiam mi estas malsata? — Kaj la kato tuj volis deŝiri la kapon de la pasero.

— Sed ĉu vi ne hontas, altestimata kato! — denove ekpepis la pasero. — Jen vi ankoraŭ ne lavis vin. Ĉu vi, kiu vivas en domo kune kun homoj, ne scias, ke ĉiu civilizita homo unue lavas siajn manojn kaj poste manĝas?

— Ho, jes, tio estas verol! — respondis la kato kaj levis piedeton por viŝi sian buŝon.

En tiu momento la pasero eksentis sin libera, etendis flugilojn kaj forflugis.

Kolera la kato ekkriis:

— Ho, duan fojon vi no trompos min! La homoj faru, kion ili volas, sed mi unue manĝos kaj poste lavos min.

Ekde tiam ĉiu kato sin lavas nur post manĝo.

Esperan'igis:

Petko ARNAUDOV

Omaga al Petko Palikarov el Etopole

LA RUĜA CIKONIO

Mi trovis baj* Petko'n sidanta ĉe tablo en sia domo kaj babilanta kun amiko de lia juneco — Vasil Simenov, ankaŭ e-isto. Kiel kutime, ni ekparolis pri E-aferoj. En iu momento unu el ambaŭ kunparolantoj demandis min ĉu mi scias ion pri la ruĝa cikonio. Surprizita, mi same respondis per demando:

— Kia ruĝa cikonio? Mi scias, ke estas blankaj cikonioj, kiuj venas ĉiujrintempe en nian landon. Krome mi vidis nigran cikionon en la bestĝardeno, tamen ruĝan — neniam.

Ili ambaŭ ekridetis ruĝe kaj baj Petko diris:

— ... Estis la jaro 1935. La printempo venis iom pli frue ol ordinare. La birdoj, inter kiuj ankaŭ la cikonioj — la blankaj, kompreneble estas allugintaj. Proksimiĝis la Unua de Majo — la granda festo de la laborista klaso. La komsomolanoj** en Etopole decidis fari ion nekutiman por celebri la Internacian Feston de la Laboro. En niajn kapejn venis originala ideo: kapti cikionon, kolorigi ĝin ruĝe kaj flugigi ĝin super la urbeto. ... Kaj tiel ni faris! ...

La sekvontan frumatenton — la Unuan de Majo super la urbeto estis ŝvebanta ruĝe kolorigita cikonio! ... Mirinda evento, kiu provokis neatenditan grandan

efikon! ... La loĝantaro vigle kaj diversmaniere komentis la eventon. La urbeto zumis kiel abelujo. La riĉuloj kaj iliaj gardistoj — la policanoj estis kolerigitaj ekster si. La malriĉuloj triumfis kaj rigardante laŭtvoĉe diradis unu al la alia:

— Tiu ruĝa cikonio salutas nin okaze de la Festo de la Laboro!

La furiozaj policanoj provis kapti la ruĝan cikionon, sed tio ne estis facila. Kiam post kelkaj tagoj ili sukcesis kapti la birdon kaj provis forigi la ruĝan farbon, atendis ilin nova surprizo: la tinkturo, per kiu ni kolorigis la cikionon, estis neforigebla!

— Kial ili ne mortpafis la cikionon? — demandis mi seivoleme.

— Ĉar estas leĝo, kiu protektas tiujn birdojn. Tiel estas ankaŭ nun. — respondis baj Petko.

— Kaj poste? Kio okazis al vi poste?


— Oni arestis nin, kondukis nin al la distrikta urbo, kie ni estis kruele torturitaj dum du semajnoj. ...

— Sed kiamaniere la polico komprenis, ke ĝuste vi faris tion? — demandis mi denove.

— Ĉar tiam ni estis suspektataj junuloj. Oni arestis kelkajn el ni nur pro suspekto, kaj sub la ungoj de iuj trovis spurojn de la ruĝa farbo. ...

* Baj — adresvorto de estimo al pli aĝa persono

NIA FABELA MELNIK



Melnik! Kio vi estas?
Kial vi altiras tiel forte ĉiujn, kiuj foje
vin vizitis?

Kial do ili ĉiam revenas al vi?
Eble ĉar vi estas ido de la eterna strebo
de la naturo al beleco?

Viaj piramidoj estas neforgesbla miraklo
de la naturo. Situantaj en la piedoj de la bele-
ga Pirin-montaro, ili similas al fabelaj
kasteloj aŭ al glaciigintaj orsimilaj ondoj,
prikantitaj en malnovaj legendoj...

La historio estis malavara kaj tre kruela
al vi, nia kara Melnik! Kreita jam en la anti-
kveco, defendita de la naturaj muroj, sur
kiuj estis konstruitaj fortikaĵoj, Despoto
Slav, proklamis vin sia ĉefurbo, kaj vi ko-
mencis vian maltrankvilan vojon tra la
historio...

Sangiĝis la regantoj, kiuj postlasis ori-
ginalajn konstruaĵojn, preĝejojn... Forpasis
bulgaraj kaj bizancaj reĝoj, venis la otoma-
noj... Kelkfoje vi estis detruita kaj denove
rekonstruita — ĉiam pli bela ol antaŭe.

Dum la batalo kontraŭ la otomana jugo vi
estigis ĉefurbo de la „reĝo de Pirin-montaro” —
la fama bulgara ribelulo kaj revoluciulo
Jane Sandanski, kuraĝa defendanto de la
sklavigita bulgara loĝantaro. Por konservi
la bulgaran nacian spiriton kaj kulturon, Jane
konstruigis lernejojn, en kiuj oni instruis bul-
garlingve; por ĉesigi la religian kaj kultur-

klerigan influon de la grekaj pastroj, li kon-
struigis ankaŭ preĝejojn ĝis Roĝen-monaĥejo.

Pri sia glora filo Jane la bulgara popolo
kreis kaj kantadas multajn kantojn, plen-
plenajn je amo, estimo kaj danko al li...

Multajn malpacajn jarojn, multajn detruojn
travivis Melnik kaj ĝia loĝantaro... Jam
floranta urbo kun vigla komerca, kulturkle-
riga kaj politika agado, en kies serpentumantaj
ŝtonaj stratetoj oni povis renkonti fremdlandajn
komercistojn, barbohavaĵajn revoluciulojn, ĉar-
majn belulinojn kaj enspiradi la specifan odoron
de la densa ruĝa Melnik-vino. Dum la turmentaj
jaroj de la Balkana Mulito (1912) kaj la
kapitalisma reĝimo Melnik denove estis ruini-
gita kaj estis nomita „la mortanta urbo”...

Post la liberigo de Bulgario el sub faŝisma
kaj kapitalisma tiraneco Melnik denove ekfloris
kaj prosperas en la socialisma konstruado —
pli ĉarma kaj pli alloga ol ĝis nun.

Melnik estas simbolo de perfekteco: plej
antikva legendo kaj plej bela nuntempa fabelo!

Gi gastame atendas vin.

Ivan APOSTOLOV

DISTROJ

SUPO EL LITEROJ

Tiu ĉi kvadrato plena je literoj
enhavas ses nomojn de floroj.

Serĉu ilin!

Pro tio vi povas legi horizontale,
vertikale kaj eĉ diagonale — en
ambaŭ direktoj, sed ne preterlasu literojn!

O	C	P	R	E	G	O	N
P	R	O	J	I	I	L	E
I	U	D	K	J	E	V	S
L	S	I	A	K	R	I	O
U	L	A	A	L	P	A	N
T	O	N	G	A	I	J	A
H	T	T	U	K	R	O	L
O	Z	O	R	T	E	N	E